*Ĵamborea Lingvo* / J.K. Hammer
bildoj de J. Le Couteur kaj aliaj.
Grafika prezentado: Melle Hammer
eldono por *Skolta Esperanto-Ligo*, 1994

© Ĉiuj rajtoj ĉe J.K. Hammer, Zaandam, Nederlando.

Organizaĵoj en landoj kun ekonomiaj problemoj, kie aĉeto ne eblas, povas peti permeson por represo aŭ kopiado.

ISBN 90-71205-51-7
UGI: 467
UDK: 061.9
SISO: 494

D/1994/2924/3

**1** **La patrolo**



| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **nomo** | **Niko** | **Petro** | **Karlo** | **Diko** | **Alko** | **Eto** |
| | skolto + | skolto + | skolto + | skolto + | skolto + | skolto |
| numero | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
| | unu | du | tri | kvar | kvin | ses |

Niko estas skolto numero unu.
Petro estas skolto numero du.
La numero de Karlo estas tri.
La numero de Diko estas kvar.

& kaj + plus = estas

**2** **-j**

Niko estas skolto. Karlo estas skolto. Niko kaj Karlo estas skolto**j**.
1+1=2 Unu skolto plus unu skolto estas du skolto**j**.
2+1=3 Du skoltoj plus unu skolto estas tri skolto**j**.
Ses skolto**j** estas unu patrolo.

**3** **-a**

Niko estas skolto numero unu. Niko estas la unu**a** skolto.
Petro estas skolto numero du. Petro estas la du**a** skolto.
Karlo estas skolto numero tri. Karlo estas la tri**a** skolto.
La kvar**a** skolto estas Diko, kaj la ses**a** estas Eto.

**4** **ĉu?**

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **??** | **1** | **+** | **1** | **=** | **3** | |
| ĉu | unu | plus | unu | estas | tri? | jes/ ne |
| **??** | **2** | **+** | **2** | **=** | **4** | |
| ĉu | du | plus | du | estas | kvar? | jes/ ne |

Ĉu Niko estas skolto? Jes, Niko estas skolto.
Ĉu Niko kaj Petro estas skolto? Ne, Niko kaj Petro estas skoltoj!

Ĉu Diko estas la tria skolto de la patrolo? Ne, Diko estas la kvara skolto.
Ĉu Eto estas skolto numero ses? Jes, Eto estas la sesa skolto.
Ĉu la patrolo estas sep skoltoj? Ne, la patrolo estas ses skoltoj.

sep = 7

5



**mi** estas skolto



**vi** estas skolto



**vi** estas skoltoj



Niko / **li** estas skolto



Julia / **ŝi** estas skoltino





**ni** estas skoltoj

Niko kaj Karlo kaj Eto / **ili** estas skoltoj.

6 **Nombroj**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| unu | du | tri | kvar | kvin |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
| ses | sep | ok | naŭ | dek |

7 **-ino**



Ĉu Julia estas skolto? Ne, Julia ne estas skolto.
Julia estas skolt**ino**.

Niko / **li** estas skolto. Julia / **ŝi** estas skolt**ino**.

8 **La familio Hanson.**




Sinjoro Hanson estas la patro de Karlo kaj Julia.
Sinjor**ino** Hanson estas la patr**ino** de ili.
Karlo estas la filo de sinjoro kaj sinjorino Hanson.
Julia estas **la filino** de ili.
Karlo estas la frato de Julia. Julia estas la frat**ino** de Karlo.
Sinjoro Hanson estas la edzo de sinjorino Hanson.
Sinjorino Hanson estas la edz**ino** de sinjoro Hanson.
Sinjoro Hanson estas viro. Sinjorino Hanson estas vir**ino**.
Karlo estas knabo. Julia estas knab**ino**. Knaboj kaj knabinoj estas infanoj.




Birdoj, fiŝoj kaj elefantoj estas bestoj.
Knaboj kaj knabinoj estas infanoj.
Ili estas homoj, ili ne estas bestoj!

9 ***Ekzerco***

*Ĉu unu kaj du estas kvar? ... unu kaj du estas ... .*
*Ĉu Karlo estas skolto? ... kaj Julia estas sko ... .*
*Sinjoro Hanson estas la p... de Karlo. Karlo estas la ... de Julia.*
*Julia estas la ... de Sinjoro Hanson.*
*La unua skolto en la patrolo estas ... kaj Alko estas la ... .*
*Julia estas knab... kaj Eto estas kn... .*
*Skolto numero du estas ... ,la tria estas ...*
*kaj la nomo de numero kvin estas ... .*

**10** **Vidas, helpas, ...-n**

Eto vidas Petron. Petro vidas Eton. Li helpas Eton.



Ĉu skolto helpas skolton? Jes, skolto helpas skolton.
Skolto helpas skoltojn, kaj ne-skoltojn. Skolto helpas homojn.
Ĉu skolto helpas bestojn? Jes, skolto helpas homojn kaj bestojn.
Skolto helpas ankaŭ bestojn.

ankaŭ = GB, USA: also, too F: aussi D: auch NL: ook

**11** **Ŝi... virino**

Julia ne estas skolto. **Ŝi** estas skoltino.
Julia ne estas knabo. **Ŝi** estas knabino.

**Li... viro**

Niko estas skolto. **Li** estas skolto.
Niko kaj Karlo estas skoltoj. **Ili** estas skoltoj.

**Ĝi... besto**

Birdo ne estas skolto. **Ĝi** estas besto.
Birdoj kaj fiŝoj ne estas homoj. **Ili** estas bestoj.

**12** **Kiom?**

Kiom estas kvin plus kvar? Naŭ!
Kiom estas du plus tri? Kvin!
Kiom da skoltoj estas unu patrolo? Ses!

**Kiu?**

Kiu estas la frato de Julia? Karlo!
Kiu estas la fratino de Karlo? Julia!
Kiu estas la kvina skolto? Alko!

**Kie?**

Kie estas Londono? Londono estas en Britio.
Kie estas Britio? Britio estas en Eŭropo.
Kie estas Niko? Niko estas en Nederlando.

**13** **La mondo**


La kvin kontinentoj estas: Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio,
kaj la kvina estas Eŭropo.
Japanio kaj Ĉinio estas landoj en Azio.
Nederlando, Britio, Italio estas landoj en Eŭropo.



| | |
|---|---|
| Nov-Jorko = | New York |
| Londono = | London |
| Montevideo = | Montevideo |
| Parizo = | Paris |
| | estas urboj. |

**14** **Kia?**



Kia estas Petro? Petro estas granda.
Kaj kia estas Diko? Diko estas dika.
Kia estas Nov-Jorko? Nov-Jorko estas granda.
Kaj kiaj estas insektoj? Insektoj estas malgrandaj.
Kaj kia estas elefanto? Elefanto estas granda.



granda dika elefanto insektoj

**15** **Kia estas la standardo?**

La standardo de Nederlando estas ruĝa, blanka, kaj blua.
La standardo de Germanio estas nigra, ruĝa kaj flava.
La standardo de Indonezio estas en du koloroj: ruĝa kaj blanka.


standardo  stelo 

La standardo de Usono havas ruĝajn kaj blankajn striojn;
En la blua kvadrato estas blankaj steloj.




Usono = U.S.N.= Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko = USA

**16** **Fruktoj**

Kiaj ili estas? Bananoj kaj citronoj estas flavaj.
La tomato havas ruĝan koloron.
La koloro de oranĝo estas oranĝa.

 pomo  banano  piro  ĉerizoj

**17** **Tago kaj nokto**


 suno
 luno
 stelo


tago


nokto

Dum la tago la suno brilas. Dum la tago ni laboras.
Dum la nokto la luno brilas. Dum la nokto ni dormas.
La suno brilas = la suno donas lumon.

En la ĉielo estas nubo 


Li dormas en lito.


**18** **Mal-**


La ŝnuro estas forta.


La ŝnuro estas **mal**forta.


Bona nodo kaj **mal**bona nodo.


Dika arbo kaj **mal**dika arbo.


Petro estas granda, kaj Eto **mal**granda.

Tago estas la **malo** de nokto.
La tago estas luma, kaj la nokto estas **mal**luma.
Dum la nokto ni dormas, dum la tago ni ne dormas.

Niko ridas kaj  Alko ploras. Ridi estas la malo de plori.

**19** **La direktoj de la kompaso**

Nordo estas la malo de Sudo. Kaj Okcidento estas la malo de Oriento.



20 **Nombroj**

| 0 | 10 | 20 | 30 | 100 | 400 | 500 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| nulo | dek | dudek | tridek | cent | kvarcent | kvincent |

| 1000 | 6000 | 7000 |
|---|---|---|
| mil | sesmil | sepmil |

11 = 10 + 1 = dek unu
12 = 10 + 2 = dek du
23 = 20 + 3 = dudek tri
86 = 80 + 6 = okdek ses

| 6758 = | 6000 + | 700 + | 50 + | 8 |
|---|---|---|---|---|
| | sesmil | sepcent | kvindek | ok |

---

Zamenhof naskiĝis en la jaro **1859**
mil okcent kvindek naŭ

---

Baden Powell mortis en la jaro **1941**
mil naŭcent kvardek unu

**Kalkuli**

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| **Adicii** | **4** kvar | **+** plus | **8** ok | **=** estas | **12** dek du |
| **Subrahi** | **24** dudek kvar | **-** minus | **6** ses | **=** estas | **18** dek ok |
| **Multipliki** | **5 x** kvinoble | | **6** ses | **=** estas | **30** tridek |
| **Dividi** | **45** kvardek kvin | **:** dividita per | **9** naŭ | **=** estas | **5** kvin |

$^1/_2$ = unu / duono
$^2/_3$ = du / trionoj
$^7/_{10}$ = sep / dekonoj
$7\ ^1/_2$ = sep kaj duono
$8\ ^3/_4$ = ok kaj tri kvaronoj


21 **kiu** Kiu li estas?
Li estas Petro Smit.

**kio** Kio li estas?
Li estas skolto.

**kia** Kia li estas?
Li estas granda.

**kiam** Kiam li dormas?
Li dormas dum la nokto.

**kie** Kie li dormas?
Li dormas en la lito.



**Demando:**
Kiom da skoltoj estas unu patrolo?
**Respondo:**
Unu patrolo estas ses skoltoj!
Kiuj fruktoj estas flavaj?
Citronoj kaj bananoj!
Kiu frukto estas ruĝa?
Tomato estas ruĝa!
Kiu ploras kaj kiu ridas?
Alko ploras kaj Niko ridas.

Eto estas skolto. Li estas malgranda.
kiu kio kia

22 ***Ekzerco kiu- kio- kie- kiam- ...Lordo Baden-Powell of Gilwell***
*K... estis la unua skolto?*
*Lordo Baden Powell !*
*K... li naskiĝis?*
*En la jaro 1857 !*
*K... li mortis?*
*En la jaro 1941 !*
*K... li mortis?*
*En Kenio, Afriko !*
*K... estis la unua skolta tendaro?*
*En 'Brownsea Island' !*
*K... estis la unua skolta tendaro?*
*En la jaro 1907 !*
*K... estis la unua Monda Jamboreo?*



*En Olimpia, Londono !*

*K... la Monda Ĵamboreo okazis en Nederlando?*

*En la jaro 1937, kaj en la jaro 1995 !*

*K... da jaroj estas inter du Mondaj Ĵamboreoj?*

*Inter du Mondaj Ĵamboreoj estas 4 jaroj !*

*K... okazis en 1957?*

*Tiam okazis la Jubilea Ĵamboreo en Sutton park !*

**23 Lazaro Ludoviko Zamenhof**

**Doktoro L.L. Zamenhof naskiĝis en la jaro 1859, en la urbo Bjalistok, en Pollando. Li mortis en la jaro 1917, kaj li estis la unua esperantisto. La unua Esperanto-Kongreso okazis en la jaro 1905, en la urbo Boulogne-sur-mer, en Francio.**

**24 -e**

 Niko skribas bele  Karlo skribas malbele




Alko iras rapide kaj Eto iras malrapide



Li kantas. Ĉu li kantas bele aŭ malbele?
Ĉu vi povas kanti bele?

Li kant**as** bel**e** -
**as & e**

La kant**o** estas bel**a**.
**o & a**



Li salt**as** alt**e**.
**as & e**

La salt**o** estas alt**a**;
**o & a**



La alt**a** salt**o**.
**a & o**

**25 *Ekzerco li, ŝi, ĝi, ili***


*Usono estas granda lando; Nederlando ne estas granda,*
*... estas malgranda. La standardo de Nederlando havas tri kolor... ,*
*ili estas ... , ... kaj ... .*
*Ĉu elefanto estas granda besto? Jes, ... estas granda.*
*Julia ne estas skolto, ... estas skoltino.*
*Fiŝo ne estas homo, ... estas besto.*
*La luno ne brilas dum la tago, ... brilas dum la nokto.*
*Ĉu steloj brilas dum la nokto? Jes, ... brilas dum la nokto.*
*Kio estas la koloro de bananoj kaj citronoj? ... estas flavaj.*
*La tomato ne estas flava, ... estas ruĝa.*

**26 Du kantoj**

Ĉu vi kantas bele? Ne? Kial ne?
Kial vi ne kantas? Jen estas du belaj kantoj.
La unua estas 'Urbo brulas', la dua estas la kanto pri 'Frato Ĵako'.
Ili estas kanonoj.

kanono = ĉenkanto

Ili estas ĉenkantoj por kvar personoj.
Numero unu kantas ĝis II, tiam la dua persono kantas.

 ĉeno  akvo  flamoj fajro  sonorilo

Li dormas sub arbo.



**Urbo brulas**

ĉenkanto



**Frato Ĵako**

ĉenkanto




**27** **La kalendaro**




Hieraŭ estis la sesa.

Hodiaŭ estas la sepa.




Morgaŭ estos la oka.

En la jaro estas dek du **monatoj**.

En la **semajno** estas sep **tagoj**.

Tago kaj nokto = tagnokto. Tagnokto estas 24 horoj.

Horo estas 60 minutoj.

Minuto estas 60 sekundoj.

| **Monatoj:** | **Tagoj:** |
|---|---|
| Januaro | Dimanĉo |
| Februaro | Lundo |
| Marto | Mardo |
| Aprilo | Merkredo |
| Majo | Ĵaŭdo |
| Junio | Vendredo |
| Julio | Sabato |
| Aŭgusto | |
| Septembro | |
| Oktobro | |
| Novembro | |
| Decembro | |

**28** **-os** **-as** **-is**



Li fiŝkapt**os**



Li fiŝkapt**as**



Li fiŝkapt**is**!

Li manĝ**os**



Li manĝ**as**



Li manĝ**is**!



**29**

**A** litero

**3** cifero

**kanto** vorto

**li kantas bele** frazo



paĝo



libro



inko

plumo kaj krajono



**30** **-n** **'La viro kaptis la urso!'**

Kiu kaptis?

Ĉu la viro kaptis?? Ĉu la urso kaptis??

Mi ne povas kompreni tion, ĉar la frazo estas malbona!

Bonaj frazoj estas:

La **viro** kaptis: La viro kaptis la urso**n**.

La **urso** kaptis: La urso kaptis la viro**n**. aŭ: La viro**n** kaptis la urso.



La urso kaptis la viro**n**.




La viro kaptis la urso**n**.

**31** **Niko havas libron.**

Kie estas en la libro? En la libro estas paĝoj.
Antaŭ Niko estas la kvina paĝo.
Kion Niko havas? Li havas krajonon.
Li skribas ion.
Kion li skribas? Li skribas kanton.




**32** **Kiel skribis la indianoj?**




Ĉu vi povas kompreni kiel la indianoj skribis?

**33** **Letero de indiano**



**34** **-estro**

Niko estas la unua skolto de la patrolo. Li estas patrol-**estro**.
La patro de Petro estas la unua viro sur ŝipo. Li estas ŝip-**estro**.

La patro de Petro  ŝipo 

La patro de Alko estas la unua viro en la urbo. Li estas urb-estro.
Kio estas skoltestro? Baden Powell estis tio.
Kio estas familiestro? Sinjoro Hanson estas tio.

**35**

| iu | io | ia | ie | iom | iel |
|---|---|---|---|---|---|
| Kiu? | Kio? | Kia? | Kie? | Kiom? | Kiel? |
| Tiu! | Tio! | Tia! | Tie! | Tiom! | Tiel! |

Iu estas la patrolestro.
Kiu estas la patrolestro?
Tiu estas Niko.
Io estas en la mano de Niko.
Kio estas en la mano de Niko?
Tio estas la standardo.
Ia la tomato estas.
Kia la tomato estas?
Tia ĝi estas: ruĝa!
Ie estas Parizo.
Kie estas Parizo? En Francio,
Tie estas Parizo.
Iom da skoltoj estas unu patrolo.
Kiom da skoltoj estas unu patrolo?
Tiom: ses!
Alko pafas bone!
Iel Alko pafas.
Kiel Alko pafas?
Li pafas bone,
Tiel li pafas!



Alko pafas bone!



mano

DEMANDO **K** RESPONDO **T**

**36** **La ses membroj de la patrolo**





**1.**
Niko estas la P.E. Kion li havas sur la bluzo?
Sur la bluzo li havas insignon.
La insigno estas: Lilifloro, inter du blankaj strioj.
P.E. = patrolestro



**2.**
La dua skolto estas Petro.
Li estas sub-P.E. Li estas granda. Lia patro estas ŝip-estro.




**3.**
La tria en la patrolo estas Karlo.
Li havas grandajn orelojn.
Li havas belan libron.
La nomo de la libro estas:
Skoltaj Kantoj'.



**4.**
Kiu estas la kvara skolto?
Tiu estas Diko.
Kia li estas?
Li estas dika!
Li estas dika, ĉar li manĝas multe!

**5.**
Kio estas sur la kapo de la kvina skolto?
Sur lia kapo estas ĉapelo.
Kia la ĉapelo estas?
La ĉapelo estas granda!





**6.**
La lasta skolto estas Eto.
Tiu estas malgranda skolto.
Li estas juna.
Li havas 12 jarojn.

Jen, vi konas **ĉiujn skoltojn** de la patrolo.Ili estas bonaj **amikoj**.

**37** **mia, via, ilia**
La ĉapelo de mi = mi**a** ĉapelo.
La patro de vi = vi**a** patro.
La patrolo de ili = ili**a** patrolo.

Alko diras: 'Mia patro estas urbestro. Kio estas via patro, Petro?'
Petro respondas: 'Mia patro estas ŝipestro!'

**38** **-ulo**
Ulo estas persono.

Granda persono estas grand**ulo**.
Dika persono estas dik**ulo**.
Bona persono estas bon**ulo**.
Petro estas grandulo kaj Eto estas malgrandulo.
Kaj Diko estas dikulo!



Li ne havas okulojn.
Per la okuloj oni vidas. Li ne povas vidi.
Li estas blindulo, ĉar li estas blinda.



Li ne havas orelojn.
Per la oreloj oni aŭdas. Li ne povas aŭdi.
Li estas surda! Li estas surdulo.



Li ne havas buŝon.
Per la buŝo oni parolas. Li ne povas paroli.
Li estas mutulo, ĉar li estas muta.

**39** **-ejo**
Ejo estas loko por io.
Loko: domo aŭ ĉambro aŭ tereno.

 Skolt**ej**o estas domo por la skoltoj.
 Bicikl**ej**o estas malgranda domo por la bicikloj.
 Dorm**ej**o estas ĉambro por dormi.
 Tend**ej**o estas tereno por tendoj.


Kio estas: manĝejo? patrolejo? fajrejo? naĝejo?

**40** **La tri ĉapeloj (enigmo)**

Kiu ĉapelo apartenas al skolto? ...

Kiu ĉapelo apartenas al ŝipestro? ...

Kiu ĉapelo apartenas al urbestro? ...



a b c


**41** **La skolta uniformo**




Jen estas du skoltoj kaj du skoltinoj.
En la uniformo de la granda skolto estas:
bluzo (1), pantaloneto (2), ŝtrumpoj (3), kaj ŝuoj (4).
Sur la brusto de la bluzo estas du poŝoj.
Ĉirkaŭ la talio estas zono (5), ĉirkaŭ la kruroj estas krurzonoj (6),
kaj ĉirkaŭ la kolo estas kol-tuko (7).
Sur la ŝultro estas rubandoj (8), kaj sur la kapo estas la ĉapelo (10).
La malgranda skolto havas trikoton (9) anstataŭ bluzon, kaj sur lia kapo ne estas ĉapelo, sed kepo (11).
En la uniformo de la granda skoltino estas bluzo (b) kaj jupo (c),
sed la malgranda skoltino havas robon (a).
Ĉirkaŭ la kolo ne estas kol-tuko sed kravato (d),
kaj sur la kapo estas ĉapo anstataŭ ĉapelo (e).

Tiaj estas la uniformoj de skoltoj kaj skoltinoj!

**42** **Kelkaj partoj de la korpo.**





Kelkaj = ne multaj.

1 kapo
2 kolo
3 ŝultro
4 brako
5 mano
6 brusto
7 dorso
8 kruro
9 piedo


Sur la mano estas fingroj. Sur la piedo estas pied-fingroj.




**43** **La ŝranko**




1 La vazo kun la floroj staras **sur** la ŝranko.
2 La lampo estas **super** la ŝranko.
3 La botelo estas **en** la ŝranko.
4 La bastono estas **kontraŭ** la ŝranko.
5 La ŝuoj estas **sub** la ŝranko.
6 La muso iras **al** la ŝranko.
7 La ŝlosilo **de** la ŝranko.




8a Mi metas la vazon sur la ŝranko**n**.
8b La vazo staras sur la ŝranko.
9a Mi metas la botelon en la ŝranko**n**.
9b La botelo staras en la ŝranko.
10a La muso iras sub la ŝranko**n**.
10b La muso sidas sub la ŝranko.

**44** **_Ekzerco._**

*La domo por la skoltoj estas la ... .*
*kaj en tiu domo la patrolo havas ... La bicikloj estas en la ... .*
*Skolto havas uniformon. Sur la kapo estas ..., ĉirkaŭ la kolo estas ... .*
*La kruroj havas ... kaj sur la piedoj estas ... .*
*La insigno de Patrol-estro estas du ... sur la ... .*
*Petro estas granda persono, li estas gr..., kaj Eto estas ... .*
*Kiel oni skribas 7465 en vortoj? Tiel: ... .*
*Dika persono estas ... . Blindulo estas persono, kiu ne povas ... .*
*Surdulo estas persono, kiu ne povas ... .*

**45** **La horloĝo; la tempo**

La horloĝo havas du montrilojn.Per la montriloj ĝi montras la horon.
La granda montrilo montras la minutojn.
La malgranda montrilo montras la horojn.

**Kioma horo estas?**




La horloĝo montras la trian horon,
aŭ: Estas la tria horo,
aŭ: Estas la tria.




La horloĝo montras duonon post la oka horo.
aŭ: Estas duono post la oka,
aŭ: Estas la oka tridek.




Estas kvarono post la deka horo,
aŭ: Estas la deka kaj dek kvin.




Estas ok (minutoj) antaŭ la unua (horo),
aŭ: 12 h + 52 min.
Estas la dekdua kaj kvindek du




8h + 20 min.:
Estas la oka dudek.




3h. + 36 min.:
Estas la tria kaj tridek ses.




La 12-a horo estas la tagmezo. Kiam estas la noktmezo?
En la nokto ni dormas en la lito.

**46** **Ordonoj**

Kiu ordonas?
La estro ordonas!
La policisto ordonas! La policisto ordonas: 'Haltu!'





Saltu!



Atentu!



La rabisto ordonas:
'Donu vian monon!'

Tio estas la kvardek-sesa (46-a) leciono de via libro.
Lernu bone, kaj vi bone parolos 'esperanton'!

La skolta devizo estas: **ESTU PRETA**


En la angla lingvo ĝi estas: **Be prepared**.

**47** **La domo**




1 tegmento
2 fenestro
3 muro
4 pordo


La domo estas en la ĝardeno.
En la ĝardeno estas plantoj.




5 arbo
6 trunko
7 branĉo
8 folio
9 floro
10 radiko

La koloro de folio estas verda.

**48** **La problemo pri la kvar fotoj**





La fama detektivo Sherlock Holmes
rigardis la helpanton Watson.
'Kio estas via opinio pri la problemo?',
li demandis.
Watson rigardis la kvar fotojn sur la tablo.
Li respondis: 'Mi ne komprenas.
Vi diras ke la viro faris foton je la sepa horo,
je la deka horo, kaj en la tagmezo.
Sed sur la tablo ne estas tri, sed kvar fotoj...'
'Jes, mia kara Watson. Sed la viro faris je la sepa horo du fotojn...
rigardu bone!' Watson rigardis la fotojn atente. Ili ne havas numerojn.
Kiel Holmes povas scii, kiu foto estas de la sepa horo,
kiu de la deka, kaj kiu de la tagmezo?
Kaj kiel Holmes scias, ke la viro faris du fotojn je la sepa horo?
'Mi ne komprenas,' li diris, ' la fotoj ne havas numerojn; Kiel vi...'
'Kara Watson, vi havas du okulojn.
Uzu ilin!
La fotoj ja montras la tempon...!'
Sed Watson ne vidis tion...




*Ĉu vi scias la tempon,*
*en kiu la viro faris la fotojn?*
*Kaj kiel Sherlock Holmes scias, ke li faris du fotojn je la sepa horo?*

**49** **Tiel...kiel, pli...ol, plej...**




Jen estas kvar linioj. Ili ne estas egalaj.
Linio A estas mallonga linio, kaj linio D estas longa linio.

A kaj B estas egalaj.
A estas **tiel** longa **kiel** B.
C estas **pli** longa **ol** A kaj B.
D estas la **plej** longa linio.



Diko estas pli dika ol Alko. Diko estas la **plej** dika **el** la skoltoj.
Eto estas pli malgranda ol la aliaj skoltoj.
Li estas la plej malgranda de la patrolo.

## 1,2,3,4,5

estas nombroj.
5 estas la plej granda nombro el ili.
4 estas pli ol 3.

En la vespero kaj en la mateno la ombroj estas longaj. En la tagmezo la ombroj estas plej mallongaj. Je la sepa horo la ombro estas pli longa ol je la deka. Tio estas la solvo de la problemo pri la kvar fotoj, kio estas en leciono numero 48. Nun vi scias kiel Sherlock Holmes scias la tempon de la fotoj.


**50** **Tre**

La Blanka Monto (Mont Blanc) estas **tre** alta monto.
Sed ĝi ne estas la plej alta monto!
La plej alta monto estas Monto Everest.
Tre longaj riveroj en Eŭropo estas Volgo kaj Danubo.
En Afriko Nilo estas tre longa.
Nilo estas preskaŭ **tiel** longa **kiel** Amazono en Sud-Ameriko.

**51** **Kie estas la Nordo? (1)**





Metu vian horloĝon sur la teron.
La malgranda montrilo estu en la direkto de la suno.
Precize inter la malgranda montrilo kaj la nombro '12'
estas la Nordo (aŭ la Sudo).
Sur la norda duono de la mondo: la Sudo, kaj sur la suda duono
de la mondo: la Nordo.




sur la teron
sur la tero

**52** **Kie estas la Nordo? (2)**




En la mateno, kaj en la verspero la ombroj estas longaj.
En la tagmezo la ombroj ne estas longaj, sed mallongaj.
Metu bastonon vertikale en la teron. Faru cirklon ĉirkaŭ ĝi.
Notu precize, kie la ombro estas ĉe la cirklo en la mateno (A),
kaj kie la ombro estas ĉe la cirklo en la vespero (B).
Precize inter A kaj B estas la Nordo (aŭ la Sudo).
La metodo estas tre preciza, sed vi bezonas multajn horojn por fari ĝin.



en la tero**n**
en la ter**o**

**53** **-et**

Malgranda objekto estas eta.
eta = malgranda



Insekto ne estas besto, sed best**et**o.
En kudrilo ne estas truo, sed tru**et**o.
Juna skolto estas skolt**et**o.
En la skolta uniformo estas pantalon**et**o.
La trikoto de skolteto estas verda.
Sur lia kapo estas kepo.



**54** **-isto**


-isto estas persono, kiu laboras por aliaj homoj.




La hak**isto** hakas arbojn.



La mason**isto** masonas murojn.



La pentr**isto** pentras bildojn,



li uzas penikojn.

La muzikisto faras muzikon.
La presisto presas librojn.
La ĉasisto ĉasas cervojn.
La oficisto skribas leterojn en la oficejo.
La kantisto kantas por ni.
La maristo laboras sur ŝipo. Ŝipo veturas (=iras) sur la maro.
La desegnisto desegnas bildojn per krajono aŭ inko.
La konstruisto konstruas domojn.
La fotisto faras fotojn por ni.

**kaj kie ili laboras?**

La presisto presas la librojn en pres**ej**o.
La oficisto skribas en ofic**ej**o.
La fotisto faras multajn fotojn en fot**ej**o.

La patro de Alko estas urbestro.
Li laboras en la urb-domo.
La urb-domo ankaŭ estas oficejo. Ĝi estas la oficejo de la urbo.

La patro de Petro estas ŝipestro.
Ŝipestro estas la estro de la maristoj. Li ordonas, kaj la maristoj obeas lin.
obeas = ili faras, kion li diras al ili.

Mia horloĝo estas malbona. Ĝi ne bone montras la horon.
Ĝi estas difekta.
Sed la horloĝisto riparos ĝin.

**55** **Kontrolu vian horloĝon!**

Ĉu via horloĝo bone montras la horon? Kontrolu ĝin!
Jen estas tre preciza metodo por kontroli vian horloĝon.
Iru al la fenestro en la vespero.



Metu sur la fenestron paperon kun malgranda truo.
Rigardu tra la truon,
en norda aŭ suda direkto,
al unu stelo. La stelo iras en la ĉielo.




Skribu sur paperon, kiam vi ne plu povas vidi ĝin.
Morgaŭ vi faru la samon.
Skribu kiam vi ne plu vidas la stelon.

Inter la horoj estas diferenco.

Diferenco: la horoj ne estas egalaj.

La diferenco inter la horoj estu 4 minutoj!

Lundo 9h 51m, Mardo 9h 49m

Atentu! Via horloĝo estas **tro rapida**!

Lundo 9h51m, Mardo 9h47m

Via horloĝo estas **tre bona**!

Lundo 9h51m, Mardo 9h44m

Diferenco: 7 m Atentu! Nun la horloĝo estas **tro malrapida**!

Noto: La diferenco estas tre precize 3 minutoj kaj 56 sekundoj.

**Atentu bone:**

Ki**a** estas la horloĝo de Petro?
Ĝi estas bon**a**.
Bona horloĝo.

**Kiel** iras la horloĝo de Petro?
Ĝi iras bon**e**.




**Stelofiguro Granda Urso.**
Ĉu vi konas la stelojn? Ili faras belajn figurojn en la ĉielo.
Jen la figuro: 'Granda Urso'.

56 **Plej**

La plej granda kontinento estas Azio: 44.180.000 km2
La plej malgranda estas Aŭstralio: 8.960.000 km2
La plej profunda (=malalta) parto de la mondo estas la 'Challenger'-profundaĵo, en la Mariana trogo, Granda (-Pacifika) Oceano 10.916 m
La plej alta akvo-falo estas en Venezuelo.
La nomo estas: 'Anĝel'-falo 979 m
La plej larĝa akvo-falo estas la 'Khone'-kaskado en Laoso.12.792 m
La plej longa rivero estas en Usono.
Ĝi estas la fluo de Misisipi kaj Misuri 6.970 km
La plej granda insulo: Grenlando 2.175.000 km2
La plej alta konstruaĵo en Kanado ĝis nun estas la CN-turo en Toronto, 553 m
La plej longa ponto estas en Ŝan-Co, Ĉinio 144.000 m

En la Olimpiaj ludoj la plej bonaj sportistoj, la Olimpiaj ĉampionoj, ricevas 'Oran' medalon.
Sed ĝi ne estas el oro, sed orumita arĝento.
La dua ricevas arĝentan medalon.
La tria: bronzan medalon.



57 **-eg**

Kiam io estas tre, tre granda, ĝi estas grand**eg**a.
Monto Everest ne estas alta, sed alt**eg**a.
Nov-Jorko kaj Tokio estas grandegaj urboj.
Urso estas fortega besto.
Ĉu vi legis la libron: 'La vojaĝoj de Guliver'?
Guliver vizitis hom**et**ojn kaj hom**eg**ojn.

58 **Ĉiu - neniu, ĉie - nenie, ĉiam - neniam**

Ĉio estas la malo de nenio.

Kiu homo vivas sur la suno?
Neniu homo vivas sur la suno!
Ĉiu homo vivas sur la mondo.

Kiam la homoj vivos sur la suno?
Neniam ili vivos sur la suno.
La suno estas unu granda fajro.
Sed... iam la homoj vivos sur la luno.



Kiam?
Mi ne scias.
Sed la astronaŭtoj jam iris al la luno.
Julio 1969: unua homo sur la luno.

Kie estas homoj kun tri piedoj?
Kie (= en kiu lando)
Nenie la homoj havas tri piedojn.
Ĉie la homoj havas du piedojn.

**Ĉie en la mondo estas skoltoj. Iam skolto, ĉiam skolto!**

**59** **-ebla**

Mi povas manĝi pomon. Pomo estas manĝ**ebla**.
Mi ne povas vidi atomon. Atomo estas **nevidebla**.

**autr prkng str.**
Ĉu vi povas legi tion? Tio estas nelegebla.



Watson ne povis solvi la problemon pri la kvar fotoj.
Por Watson la problemo estis nesolvebla.



faldo

Mi ne povas porti mian domon. Domo estas neportebla.
Sed la dometo de heliko estas portebla!


Vi povas faldi paperon. Papero estas faldebla.
En la tendaro oni povas uzi faldeblajn litojn.

**60** **Rigardu la bildon!**

En la bildo estas persono. Li estas en la lito. Kial??
Li ne estas sana! La sinjoro en la lito estas malsana!
La sinjorino estas la flegistino. Ŝi flegas la malsanulon.
La alia persono ne estas malsana.
Li estas la kuracisto.
La flegistino kaj la kuracisto laboras en la malsanulejo.

**Ni faras vortojn**

| | | |
|---|---|---|
| sano | flegi | kuraci |
| san**a** | fleg**ist**o | kurac**ist**o |
| **mal**sana | flegist**in**o | |
| san**ul**o | | |
| **mal**sanulo | | |
| malsanul**ej**o | | |
| malsan**et**a = ne tre malsana | | |
| malsan**eg**a = tre, tre malsana | | |



Eble la sinjoro estas tre malsana,
kaj ne plu estos sana;
tiam li estas nekuracebla.
Ni ĉiuj esperas, ke li baldaŭ estos sana. Ni deziras al li: 'Bonan Sanon!'

**61** **-ilo**


ŝlosilo
La ŝlosilo estas por ŝlosi la ŝrankon aŭ la pordon.


tranĉilo
Mi tranĉas per tranĉilo kaj tondas per tondilo.


tondilo


fosilo


sonorilo
Se knabo ludas sur la vojo, mi uzas la sonorilon de la biciklo por averti lin.


kudrilo
Mi kudras la pantalonon per kudrilo.

veturiloj.
Biciklo kaj aŭto estas por veturi.


direktilo
Por direkti la aŭton mi uzas direktilon. Ankaŭ biciklo havas direktilon.


fajfilo
Mi fajfas per fajfilo kaj mi hakas per hakilo.


hakilo


fiŝ-kaptilo
Por kapti fiŝojn mi uzas fiŝ-kaptilon.


kombilo


montrilo
La horloĝo havas du montrilojn. La montriloj montras la tempon.
La vojo-montrilo diras al mi, al kie mi iras.


manĝiloj


skribiloj
Mi skribas per krajono aŭ per plumo. Ili estas skribiloj.
Tre moderna skribilo estas globo-krajono. Kio estas 'globo-krajono'?


globo


segilo


avertilo

tiel granda kiel
pli granda ol
la plej granda

2 + 4 estas tiom, kiom 5 +1

2 + 4 estas pli ol 2 + 3

Heliko estas malrapid**a** besto. Heliko iras malrapid**e**.

62 **-ig**



Tie estis malbonaj skoltoj!
La tero estas malpura.
Sur la tero, sub la arbo, estas papero,
kaj botelo, kaj skatoloj.
En la trunko de la arbo estas vundoj.
La skoltoj tranĉis literojn en la trunkon.
La arbo estos malsana pro la vundoj.

La botelo estas malplena.
La skoltoj malplen**igis** la botelon.
La tero estas malpura. La skoltoj malpur**igis** la teron.

plena botelo kaj malplena glaso 

malplena botelo kaj plena glaso 

difektita bastono 

mano kun vundo 

**Re-rigardu al leciono 60.**
Kion faras la kuracisto? Li sa**nig**as la malsanulon.
Kion li donas al li? Li donas botelon kun sa**nigilo**.


Jen estas pomoj.
Ili ne estas verdaj, ili estas ruĝaj. La suno ruĝ**igis** kaj matur**igis** la pomojn.

63 **Ĉifroj**

Ĉifro estas maniero por skribi leteron,
kiu estas ne-legebla por aliaj personoj.
Ĉu via patrolo havas sekretojn? Uzu ĉifron!

**Unua ĉifro**

Tio estas la 'ŝlosilo' de la ĉifro.




Nun vi povas legi:




**Dua ĉifro**

La letero

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| B | N | A | T | O | I | G |
| O | J | L | J | R | A | T |
| S | O | N | U | S | K | A |
| K | E | P | A | E | S | R |
| M | L | U | F | A | A | O |
| A | D | I | R | B | J | N |

La ŝlosilo




64 **-ero**

Malgranda parto de io estas -ero.

Parto de la pluvo estas pluv**ero**.
Parto de la neĝo estas neĝ**ero**.
Parto de ĉeno estas ĉen**ero**.
Parto de fajro estas fajr**ero**.

**Averto!**

En la somero unu fajrero sufiĉas por bruligi tutan arbaron!

## 65 La vetero

pluvo  vento  hajlo  neĝo 

## 66 La patrolo iras tendumi

Hura! Nun estas somero! La lernejo estas ŝlosita.
La patrolo de Niko iras por tendumi dum unu semajno.
La ses knaboj iras per bicikloj al la tendejo.
Antaŭe biciklas Niko, ĉar li estas la P.E. Apud li biciklas Karlo.
Post tiuj iras Diko kaj Alko.
Kaj malantaŭe biciklas Eto, kaj apud li estas Petro.
Ili biciklas en Nederlando. En Nederlando estas multaj bicikloj.
Junaj kaj maljunaj personoj biciklas, al la lernejoj kaj al la laborejoj.
Sed en Nederlando ne estas multaj arbaroj. Arbaroj estas maloftaj.
Nur 8 % de Nederlando estas arbaroj!

% = procentoj

ne tie






sed tie!

Kie estas la tendoj? Kaj la vestoj kaj la potoj kaj ... kaj ... kaj tiel plu?
Ili estas en sakoj sur la bicikloj.
Ili ne estas sur la dorsoj de la knaboj.
Tie ili estas kiam oni promenas!





vestoj

La vetero estas bela, la suno brilas! Ĉu tio estas vera?
Ne, la vetero est**is** bela...nun pluvas!
Kaj ĉiu prenas la pluvo-mantelon el la sako. Ĉiu? Ne!
Alko ne povas preni ĝin!
Li metis la mantelon **malsupre** en la sako, kaj tio ne estas bona.
Pluvo-mantelo devas esti **supre** en la sako.
Grandaj pluveroj falas. La pluvo malsekigas Alkon.
Alko estas malfeliĉa... li ploras!

## 67 Niko

Niko estas la P.E. Li estas gaja knabo: li ĉiam ridas!

P.E. = patrolestro

Li scias kiel la patrolo devas bicikli, ĉar li havas karton.
Sur la karto estas la vojo al la tendejo. Niko povas desegni kartojn.

desegni = fari

Ĉu vi povas desegni ilin?
Niko instruos al vi la simbolojn de la geografia karto en leciono numero 69.

simbolojn = signojn

Niko ankaŭ havas fak-insignon, kun malfacila nomo: la meteorologia insigno.
Li havas tian insignon, ĉar li povas diri, kian veteron ni havos.
Meteorologo uzas multajn ilojn: termometrojn, barometrojn kaj tiel plu.
Sed Niko povas diri la veteron sen iloj.





La bestoj kaj la nuboj rakontas la veteron al li en leciono numero 70!

## 68 La problemo de Niko

Malsupre vi trovos karton en kiu estas parto de Nederlando. Kaj nun la patrolo estas apud tiu vojo-montrilo. La problemo estas: Kie estas la patrolo?
La patrolo ne estas en urbo. Ne, urbo estas granda.
Ili estas en malgranda vilaĝo. Sed...
kie? Kiu estas la nomo?



**69 La simboloj de la geografia karto**



1 konifera arbaro
2 folia arbaro
3 deklivo
4 sablo
5 marĉo
6 lago
7 vojo
8 vojo sur digo
9 kanalo/rivero
10 vojo tra tunelo
11 arbetaĵo
12 tombejo
13 frukt-ĝardeno
14 lum-turo
15 tendejo
16 ponto
17 fabriko
18 moskeo
19 sinagogo
20 poŝt-oficejo
21 urb-domo
22 preĝejo (kristana)
23 muelejo (akvo-)
24 muelejo (vento)
25 fervojo kun stacidomo
26 elektra kondukilo

Koniferaj arboj ne havas foliojn,  sed pinglojn.

**70 Kia estos la vetero?**

La vetero estos bona,
kiam la hirundoj flugas alte kaj kiam la ranoj kvakas verspere.
Kiam la kampoj estas nebulaj, kaj la noktoj malvarmaj.
Kiam la fumo de la fajro iras rekte al supre.
Kiam la suno klare sub-iras,
kaj la konusoj de koniferaj arboj estas malfermitaj.





rekta malrekta

Malbona la vetero estos,
kiam: la hirundoj flugas malalte, la vento subite blovas,
ĉirkaŭ la luno estas nebula cirklo, kaj en la nokto ne venis roso.
roso: kiam roso venis, en la mateno la kampoj estas malsekaj.
Kaj kiam vi povas aŭdi sonojn de malproksime.



**71 Trinkaĵoj**

Kiam oni estas soifa, oni volas trinki. Kion ni trinku? Jen kelkaj trinkaĵoj:



teo el folioj

kafo el grajnoj

lakto de bovinoj

limonado el fruktoj

vino el vin-beroj

biero el greno

**72 Fulmotondro estas danĝera**

Kiam fulmotondro venas, zorgu ke vi baldaŭ havu lokon, por ŝirmi vin.
Multaj homoj perdis la vivon, ĉar ili ne faris tion en la ĝusta momento.

2 + 2 = 4 estas ĝusta
2 + 2 = 5 estas malĝusta


La ebena tereno estas tre danĝera,
ĉar la fulmoj serĉas la plej altajn objektojn. Kaj tio estas vi!

ebena= sen montoj aŭ montetoj.



Ne serĉu ŝirmon sub arboj aŭ aliaj altaj objektoj.
Haltu, serĉu lokon por sidi,kiel eble plej malaltan!
En aŭto vi estas sen danĝero, kaj la fulmo ne trafos vin.
Sed: Ne iru ekster la aŭto!
Kiam vi estas en ŝipo kun masto kaj velo, tio estas bona.
Sed nun vi atentu la venton, kiu povas subite blovi!
Bicikloj kaj aliaj metalaj objektoj estas danĝeraj,
ĉar la fulmo facile trafos ilin!
Ombrelo estas ŝirmilo kontraŭ la pluvo

**73** **Trafiko**




1 vel-ŝipo
2 motor-ŝipo
3 helikoptero
4 flugmaŝino, aviadilo
5 aŭto
6 kamiono
7 vagonaro, trajno
8 mopedo, motor-bicikl(et)o

**74** **Petro**

Petro estas la S.P.E. (Sub-patrol-estro).

Li estas la kasisto: Li havas la kason. La kaso: la mono de la patrolo.
Li estas ĝoja, ĉar en la kaso estas multe da mono.
La patro de Alko donis al li iom por aĉeti limonadon.
Kiam la patrolo biciklis dum du horoj, la knaboj estis lacaj.
Ili haltis ĉe restoracio. Tie Niko mendis limonadon.
Il ankaŭ aĉetis ĉokoladon. Dum duona horo ili ripozis,
kaj kiam ili ne plu estis lacaj, ili denove biciklis.
Sed antaŭ tio, Petro pagis por la limonado kaj la ĉokolado.
Petro ankaŭ estas la 'Unua Helpisto' de la patrolo.
Kiam iu havas vundon, Petro helpas al li kaj faras bandaĝon.

**75** **Ĉu via kesto por Unua Helpo estas en ordo? Kontrolu ĝin!**



Triangula tuko
gaza bandaĝo
elasta vindo
rapid-bandaĝo
glua strio
tondilo
fermeblaj pingloj (fibuloj)
tubo kun salicil-acetata acido ('Aspirino')
Jodo, aŭ merkuro-kromo
vato
pinĉil(et)o
laksigaj pasteloj

**76** **La problemo de Petro**

Petro havas problemon por vi:



'Iam Sinjoro Smit dormis en la lito.
Li sonĝis. En la fantazio li estis ĉe la indianoj.
La indianoj kaptis lin.
Ili volis mortigi lin per hakilo.
Sinjoro Smit tre timis. Li kriis pro timo.
En tiu momento Sinjorino Smit tuŝiŝ lin, kaj demandis:
'Kio estas al vi? Kial vi krias dum la dormo?'
Sinjoro Smit sentis la tuŝon de la edzino.
Li kredis ke nun la hakilo trafas lin.
Kaj pro timo li tuj mortis...'

Kaj nun Petro demandas al vi: 'Kial la rakonto ne povas esti vera?'

**77** **Karlo**

Karlo estas la tria en la patrolo.

Li multe scias pri la naturo. Li scias la nomojn de la arboj kaj plantoj.
Li ankaŭ scias kiu ligno estas bona por konstrui kaj por fari fajrojn.
Li estas bona hakisto.
Li instruos al vi kiel fari tenilon por via hakilo en leciono numero 81.

**78** **La problemo de Karlo**



La tendoj estas sur tendejo.
La tendejo estas insulo: ĉirkaŭ ĝi oni fosis kanalon.
La kanalo estas 2 metrojn larĝa.
Karlo havas du tabulojn.
Ili mezuriĝas nur 195 centimetrojn.
Karlo volas konstrui (=fari) ponton trans la kanalon,
sed li volas, ke la tabuloj ne estu en la akvo.
Kiel li faru?

Do: Kanalo, larĝeco estas du metroj. Tabuloj, longeco estas 195 centimetroj.
La tabuloj ne estu en la akvo.

**79** **Kelkaj iloj**

 martelo, por frapi najlojn

 ŝraŭbilo, por turni ŝraŭbojn

 segilo

 rabotilo, por glatigi lignon

 ĉizilo, por tranĉi lignon

 raspilo



 fajlilo

 smirga papero

 borilo


**80** **Avertiloj**

En la tendaro oni ofte fosas kavon en la teron,
por jeti en la kavon malpurajojn.
Vi ja scias: kiam oni manĝas, oni post kelka tempo devos 'mal-manĝi'.
Tio estas necesa! La loko por tio estas: la 'Necesejo'.
Zorgu, ke aliaj personoj ne fosu kavon en la sama loko, kie via kavo estis.
Tial: metu avertilon! La avertilo avertas: ne fosu!


La avertilo povas esti: kruco,  aŭ plektita branĉo. 

**81** **Kiel fari tenilon por la hakilo**

En la bildo estas du modeloj, norvega kaj sveda modelo.





Faru modelon el dika papero.
Inter la linioj estu 3 centrimetroj.
Metu la modelon sur lignon kun rektaj fibroj



bona malbona

kaj segu ĝis la rando de la modelo.



Forhaku per ĉizilo la superfluan lignon.



Donu pli bonan modelon per raspilo kaj rabotilo.
La tenilo estu ronda.
Tial fortranĉu de ĉiu rando 1 cm.,
sed ne kie la fero estos!






Nun glatigu ĝin per raspilo, fajlilo,
kaj per smirga papero.
Metu oleon sur la lignon, por ŝirmo.

**82** **Alko**

Alko estas la kvara membro de la patrolo.

Li lerte povas signali. Li povas signali per flagoj kaj per lanterno.
Li elpensis manieron por signali tre rapide.
Por signali oni ofte uzas la kodon de Morse.
Alko instruos al vi, kiel vi povas rapide signali,
kaj kiel vi povas uzi la Morsan Kodon kiel ĉifron.

lanterno  flago 

**83** **Signali rapide**

Vi faru diagramon: tabulo kun 5 x 5 = 25 kvadratoj.
Skribu vortojn en 16 kvadratojn, kaj literojn en 8, tiel:

| | A | B | C | D |
|---|---|---|---|---|
| E | iri | lernejo | nordo | helpo |
| F | veni | patrolejo | sudo | manĝo |
| G | bezoni | skoltejo | oriento | ŝnuro |
| H | porti | tendaro | okcidento | hakilo |

Nun vi povas sendi:

**Ni estas BF. AF AL NI, NI GA DE. HA KUN VI DH DG.**

Tio estas:

'Ni estas en la patrolejo, venu al ni, ni bezonas helpon.
Portu kun vi hakilon kaj ŝnuron.'

**84** **La Morsa Kodo kaj Esperanto**

Kiam vi ne scias la kodon por la literoj

**ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ**

kaj ŭ, vi povas uzi por ili:

**ch gh hh jh sh kaj u**

Do anstataŭ:

'Donu al mi ŝnuron, kaj tranĉilon aŭ hakilon!',

vi sendu:

'Donu al mi **sh**nuron, kaj tran**ch**ilon au hakilon!'

kaj oni certe komprenos vin.

**85** **La Morsa Kodo kiel ĉifro**

mano – – · – – · – – –

per litertipoj: VV vV Vv VVV
aŭ: AB cD Ef GHJ

per muziknotoj  aŭ aliaj manieroj



**86** **La problemo de Alko**

Iam Alko sendis leteron al Niko. En kiu estis:



Niko tute ne komprenis. Ĉu vi komprenas la leteron?

**87** **Proksimaj**

ĉi tie
ĉi tio
ĉi tiu estas proksimaj

**Malproksimaj**

tie
tio
tiu estas malproksimaj



Kiuj estas tiuj personoj?
Tiu estas mia patrino, kaj ĉi tiu estas mia patro!
Tie estas du arboj, kaj ĉi tie estas unu arbo.

88 **Dika Diko**

Diko estas la dikulo de la patrolo.

Kial li estas dika? Li ĉiam manĝas multe. Li estas grava persono,
ĉar en la tendaro Diko faras la manĝaĵojn por la patrolo.
Li kuiras terpomojn kaj legomojn kaj bakas panon.
Li ankaŭ faras teon kaj kafon por trinki. Li estas la kuiristo.
La patrolo neniam plendas pro la manĝaĵoj, ĉar Diko estas lerta kuiristo:
li kuiras bone! La manĝaĵoj ĉiam estas bonaj kaj bongustaj.

89 **Kiel baki cindro-kukojn**

En la vespero la patrolo ofte sidas ĉe la fajro, por kanti kaj por rakonti.
Tiam Diko faras la kukojn.
Karlo donas al li malmolan lignon, de kverko.
Kiam la ligno forbrulis, multaj varmaj cindroj restas.
Kaj varmaj cindroj estas bonaj por baki.
Diko faras paston el faruno, lakto aŭ akvo, salo kaj iom da bak-pulvoro.
Ĉirkaŭ la paston li metas grandajn, purajn foliojn.
Nun li metas la paketojn sub la varmajn cindrojn.
Post 15 minutoj li prenas la paketojn el la cindroj,
purigas ilin, tranĉas ilin,
kaj donas la kukojn al la skoltoj, kun sukero kaj butero.
Ili estas bongustaj!

kverko: en latina lingvo Quercus.
Aliaj arboj estas: Fago (Fagus), Betulo (Betula), Saliko (Salix).



90 **La problemo de Diko**



Jen estas unu granda kolbaso.
Kaj en la patrolo estas ses knaboj.
Nun mi tranĉas **du foje**, kaj jen!
Mi havas ses partojn.
Kiel mi faras tion?

91 **Iloj por kuiri kaj por manĝi**



kaldrono
sitelo
kuirpoto, kaserolo
te-poto
telero
kulero
forko
taso
sub-taso
kaj la pato estas por friti

92 **Kion ni uzas por hejti?**

La plej antikva materialo por hejti kaj kuiri estas ligno.



La plej modernaj materialoj estas bruleblaj gasoj: Propano kaj Butano.
Ni aĉetas ilin en metalaj botelegoj.
En la primuso ni uzas petrolon kaj iom da alkoholo.

petrolo = keroseno

En lanternoj ni ankaŭ uzas petrolon (aŭ kerosenon).
En aŭtoj ni uzas benzinon.

**N-e-n-i-a-m**
**metu benzinon en aparaton por keroseno, ĉar ĝi certe eksplodos!!**

Kiam vi aĉetas kerosenon, atentu bone ke oni ne donu al vi benzinon.
En Britio: 'petrol' = benzino!

hejti = varmigi

93 **La malgranda Eto**

Eto estas la malgrandulo de la patrolo.

Li ĉiam volas **ludi**. Eĉ en la lernejo li ĉiam ludas.
En la lernejo la instruisto demandis al li:
'Kiu urbo estas la ĉef-urbo de Francio?'
Eto respondis: 'London'. Ĉiuj ridis, sed Eto ricevis punon.
La instruisto ofte punas lin.
La patro diris al li: 'Via laboro en la lernejo devas esti pli bona.
Se tio ne estos, vi ne iros kun la patrolo al la tendaro!'
Jes, lia patro estis kolera!
Kaj ankaŭ Niko kaj Petro estis koleraj.
Ili volas ke Eto pli bone lernu. Ĉar kun Eto ili havas plezuron.
Eto ankaŭ ŝatas kanti. Li instruos al vi kelkajn kantojn.

94 **La problemo de Eto**



Eto rakontas: Iam mi staris sur ponto super kanalo.
En la kanalo veturis ŝipo. Sur la ŝipo estis persono.
La persono diris: 'Saluton, mia filo!'
Kaj mi respondis: 'Jes, mi estas via filo.
Sed vi ne estas mia patro!'

Ĉu vi povas kompreni tion?

95 **La poŝto**

Jen estas **letero**.



Oni sendas leteron en **koverto**.

Sur la koverto estas **adreso**:
nomo, strato, numero, urbo, kaj provinco aŭ departemento. Vi ne forgesu la nomon de la lando!

Oni **afrankas** leterojn per **poŝtmarkoj**.

Anstataŭ leteron oni povas uzi **poŝtkarton** aŭ **bildkarton**.

96 **(1) Letero al la hejmo**




Kaj tiu fimanĝaĵo - malbone gustas ĝi,
al pladoj de l'patrino nun sopiradas mi!
Revoku min,...

Jen kaĉo kun buletoj, kaj haŭto sur la sup'',
mi ĝin ne manĝi povas, malsatas kiel lup'!
Revoku min,...

Se tio-ĉi malbonas, malbonas noktoj pli -
en tendon pluvo venas, kaj tuj malsekas mi!
Revoku min,...

Mi tial malgrasiĝas, ho kara vi, patrin',
tuj venu al tendaro - kaj tuj revoku min!
Revoku min,...

hejmo = via domo
fimanĝaĵo = malbona manĝaĵo

96 **(2) La Krio**

teksto: F.D. Murphy




En densa afrika ĝangalo, la brunaj amikoj de ni
jam solvis la lingvan problemon; per tamtam' vojaĝas la kri': ...

Ĉe Norda Poluso eskimoj loĝadas en neĝo, glaci',
kaj kiam parolo necesas, trans blanka dezert' sonas kri': ...

En barak', kastelo, palaco, en hejmoj de ĉia meti'
gepatroj instruas infanojn, aŭdiĝas de beboj la kri': ...

Indianoj, nigruloj, eskimoj, urbanoj kaj beboj kaj mi,
jam uzas la zamenhof-lingvon, do vivu, prosperu la kri': ...

97 **La vizito**

Eto estas en la tendo. Iu venas al li. Li havas la uniformon de sveda skolto.

**Eto diras:**

Bonan matenon. Kion vi deziras?

**La respondo:**

Bonan matenon. Ĉu vi memoras min?

Ne! Kiu vi estas?

Antaŭ unu jaro, dum la ĵamboreo en Francio...

Ho, je, nun mi vidas! Vi estas Sven, el Stockholm! Envenu! Kiel vi fartas?

Mi fartas bone. Mi nun lernas por esti elektristo.

Kaj kiel vi fartas, Eto?

Bone! Sed mi devas pli bone lerni en la lernejo!

Ĉu vi ŝatas teon?

Ne, dankon!

Aŭ ĉu vi ŝatas limonadon?

Jes, volonte! La vetero estas varma!

La botelo estas malplena... Mi prenos alian... jen, mi petas!

Dankon!... La limonado estas bongusta!

Kun kiom da skoltoj vi estas el Svedio?

Nur'nia patrolo, do: ses!

Sed nun mi devas foriri,

ĉar estas tempo por nia manĝo...

Dankon pro la limonado!

Ĉu vi jam nun foriras? Revenu al ni kun viaj amikoj en la vespero.

Vi estos bonvenaj...

Jes, ni venos. Je la oka horo ni estos ĉe vi.

Sed nun mi rapide foriros por manĝi...

Jes, bonan apetiton! Kaj ĝis la revido!

Jes, ĝis la revido!

Adiaŭ!

98 **Ĉu vi ŝatas limonadon?**

Jes? Diru: Jes, mi petas! aŭ: Jes, volonte! aŭ: Jes, dankon!

Ne? Diru: Ne, mi dankas! aŭ: Ne, dankon!

Kiel vi fartas? = Ĉu vi estas sana kaj feliĉa?

99 ***Ekzerco***

*1 Ĉu Sven vizitas Eton antaŭ aŭ post la tagmezo?*
*2 Kiel vi scias tion?*
*3 Ĉu Sven ŝatas teon?*
*4 Kion li diras tial?*
*5 Kaj ĉu li ŝatas limonadon?*
*6 Kion li tial diras?*
*7 Kion Eto diras, kiam li donas la limonadon?*
*8 Kion Sven diras pro la limonado?*
*9 Kion oni diras antaŭ la manĝo?*
*10 Kial Sven diras: 'ĝis revido'?*
*11 Kio estas la saluto ĉe la foriro?*
*12 Kion Sven diros, kiam li revenas en la vespero?*
*13 Kiu el ili diros 'estu bonvena', Sven aŭ Eto?*
*14 Kiam oni diras" 'bonan nokton, dormu bone'?*

100 **Teatraĵo**

Nun vi povas fari teatraĵon kun du personoj.
Unu en la rolo de Sven, kaj unu en la rolo de Eto.
Tio estas bona ekzerco por paroli la lingvon.

101 **-aĵo**

Aĵo = io

Monto estas alta 'io'. Monto estas alt**aĵ**o.
Kuko estas bak**aĵ**o, ĉar oni bakas kukojn.
Manĝ**aĵ**o estas 'io' por manĝi.
Trink**aĵ**o estas 'io' por trinki.
Benzino kaj keroseno estas por bruli: brul**aĵ**oj.
Leteroj, libroj estas el papero: ili estas paper**aĵ**oj.

*Vi mem serĉu aliajn ekzemplojn.*

102 **En la tendaro**

En la tendaro la patrolo renkontas multajn aliajn skoltojn.
La tendaro estas internacia:
la skoltoj venas el multaj diversaj landoj, el ĉiuj kontinentoj.
En la tendaro ili havas bonan tempon. Dum la tagoj ili faras ludojn.
Kaj dum la vesperoj ili sidas ĉe la granda fajro, kaj ili kantas.
En ĉiu mateno iu legas la skoltan leĝaron, aŭ la skoltan promeson.

103 **La Skolta Promeso**

Je mia honoro mi promesas,
ke laŭ mia povo mi plenumos miajn devojn al Dio kaj al mia Patrujo,
mi ĉiam helpos aliulojn, kaj mi obeos la skoltan leĝaron.

104 **La Skolta Leĝaro**

La antikva teksto:

La honoron de skolto oni povas fidi.
Skolto estas lojala.
Skolto devas esti utila kaj helpema.
Skolto estas amiko al ĉiu, kaj frato al ĉiu alia skolto.
Skolto estas ĝentila.
Skolto estas amiko al bestoj.
Skolto obeas ordonojn.
Skolto ridetas kaj fajfas malgraŭ malfacilaĵoj.
Skolto estas ŝparema.
Skolto pure pensas, parolas kaj agas.

Pli mallonga, pli moderna estas:

Skolto estas fidinda.
Skolto estas lojala.
Skolto estas amikema, kaj atentas pri aliaj homoj.
Skolto estas frato al ĉiuj skoltoj.
Skolto havas kuraĝon en malfacilaĵoj.
Skolto bone uzas sian tempon, kaj zorgas pri la posedaĵoj de ĉiu.
Skolto respektas sin, kaj aliajn homojn.

**La Skolta Devizo:**
'Estu Preta'
aŭ: 'Ĉiam Preta'.

## 105 Malfacila problemo



Jean estas skolto el Francio.
Eiko estas ĉarma skoltino el Japanio.
Kaj Jean volas paroli kun Eiko.
Sed, krom la franca lingvo, Jean lernis nur la hispanan.
Kaj Eiko, krom la japana lingvo, lernis la portugalan.
Ŝi povas kompreni la turkan, sed ne parolas ĝin.
Do: Jean ne povas paroli kun Eiko kaj tial li estas malfeliĉa !
Sed... en la tendaro estas helpantoj.
Estas du hispanoj, Jaime kaj Manuel.
Jaime bone parolas multajn lingvojn:
la francan, la anglan kaj la turkan.
Kaj Manuel parolas la lingvoj de Italio, Japanio kaj Turkio.
En la tendaro ankaŭ estas tri Portugaloj,
la fratoj Pedro, José, kaj Antonio.
Pedero bone parolas la japanan lingvon.
José komprenas la japanan, sed ne parolas ĝin
kaj Antonio ankaŭ komprenas, sed ne parolas la japanan lingvon.
Sed li bone povas paroli france.
Margaret, la angla amikino de Antonio parolas la turkan kaj
la japanan lingvojn.

Kaj nun diru: Kio estas la plej bona maniero por helpi la malfeliĉan Jean?
Kaj kiom da personoj estas por la helpo necesaj?
Unu solvo estas en la fino de la libro.
Sed la patrolo havas pli bonan solvon!

## 106 La solvo de la patrolo

La patrolo de Niko multe ridis,
kiam ili aŭdis pri la problemo de Eiko kaj Jean.
Niko kaj Petro iris al la tendo. Ili prenis ion el la sako.
Petro iris al Jean, kaj donis ion al li. Niko iris al Eiko kaj donis ion al ŝi.
Nun Jean kaj Eiko bone povas paroli unu kaj alia,
ĉar ili ricevis libron pri la lingvo Esperanto.
La titolo(=nomo) de la libro estas:'Jamborea lingvo'.
Ĉu vi konas la libron?
Nun Jean kaj Eiko estas feliĉaj.
Kaj multaj skoltoj kaj skoltinoj en la tendaro promesis:
'Ankaŭ ni lernos la lingvon Esperanto!'

## 107 -aro

skolto + skolto + skolto + skolto + ... = skoltaro
libro + libro + libro + libro + ... = libraro



multaj arboj = unu **arbaro**
multaj tendoj = unu tend**aro**
multaj ŝipoj = unu ŝip**aro**
multaj libroj = unu libr**aro**
libro kun vortoj = vort**aro**
libro kun kantoj = kant**aro**

## 108 -ujo


La alumetoj estas en alumet**ujo**.
La mono estas en mon**ujo**.
La teo estas en te**ujo** aŭ te-poto.
La salo estas en la sal**ujo** kaj
la pipro estas en la pipr**ujo**.



## 109 -igi

La pluvo malsekigas la tendon. La suno sekigas la tendon.






Plena glaso. La skolto malplenigas la glason. Malplena glaso.



Verda pomo. La suno ruĝigas la pomon. Ruĝa pomo.



Blanka skolto. La suno brunigas la skolton. Bruna skolto.



**110** **-iĝi**

la pluvo **malsekigas** la tendon: la tendo malsekiĝas (pro la pluvo)


la suno sekigas la tendon: La tendo sekiĝas (pro la suno)



La fajro **varmigas** la akvon: La akvo varmiĝas (pro la fajro)




La skolto malplenigas la glason: La glaso malpleniĝas



La suno ruĝigas la pomon: La pomo ruĝiĝas

***111*** ***ekzerco g aŭ ĝ***



*Diko preparis teon. Li varmi...is la akvon.*

*Kiam la akvo estis varma, li metis te-foliojn en la akvon.*

*Post kelkaj minutoj la teo preti...is. Tiam Diko pleni.... la tasojn.*

*Kiam la tasoj malpleni...is, Diko denove pleni...is ilin.*

*Ĉu vi ankaŭ ŝatas teon?*

*Sed la poto jam malpleni...is kaj Diko ne plu havas teon por vi!*

*Nun la tasoj malpuri...is.*

*Petro puri...os ilin kaj Karlo seki..os ilin per tuko.*

**112** **-anta**

Knabo kiu **ridas**, estas rid**anta** knabo.

Knabo kiu skribas, estas skribanta knabo.

Lampo kiu brilas, estas brilanta lampo.

Sinjoro kiu parolas, estas parolanta sinjoro.

Sinjoro **kiu parolis**, estas parol**inta** sinjoro.

Sinjoro kiu parol**os**, estas parol**onta** sinjoro.

**-anto**

Persono kiu helpas, estas helpanto.

Persono kiu parolas, estas parolanto.


Dormanto estas dormanta persono.

manĝanto: manĝanta persono: persono kiu manĝas

dorminto: **dorminta** persono: persono kiu dormis

ludonto: ludonta persono: persono kiu ludos

**113** **-ata, -anta**




La viro kapas la fiŝon.

La fiŝo estas kaptata. (de la viro)

Li estas kaptanta.

Niko legas libron.

La libro estas legata. (de Niko)

Li estas leganta.

La skolto trinkas la akvon.

La akvo estas trinkata. (de la skolto)

Li estas trinkanta.



La viro estas kapt**onta** la fiŝon.

Li kaptos.

La fiŝo estas kapt**ota** de la viro.

La viro estas kapt**anta** la fiŝon.

Li kaptas.

La fiŝo estas kapt**ata** de la viro.



La viro estas kapt**inta** la fiŝon.

Li kaptis.

La fiŝo estas kapt**ita** de **la** viro.



## Kial?

kial = pro kio

Kial vi lernis la internacian lingvon?

Vi lernis ĝin por havi plezuron!

Kiel vi povas havi plezuron?

kiel = en kiu maniero

Vi havas plezuron kiam vi uzos la internacian lingvon en la skolta vivo.

Kion vi povas fari per Esperanto?

Ni donos al vi kelkajn ideojn.

Vi povas korespondi kun skoltoj kaj skoltinoj en aliaj landoj.
Skribu al ili pri via urbo, via lando. Pri la naturo kaj pri viaj hobioj.
Pri sporto kaj muziko.
Lernu al ili ludojn kaj kantojn.
Tio estas interesa afero.



En multaj landoj estas insignoj
por 'interpretisto' aŭ pri
'monda frateco'.
Nun ankaŭ vi povas
havi tiujn insignojn.

Per la internacia lingvo
vi povas kolekti poŝtmarkojn: ne-uzitajn,
stampitajn aŭ unua-tag-kovertojn.

Sed vi ankaŭ povas kolekti aliajn objektojn.
Plantojn, konkojn, semojn, kantojn, ludojn,
insignojn aŭ bildkartojn.

Interesa estas la korespondo per son-kasedoj.
Multaj aferoj povas esti sur la kasedo.
Ekzemple: La nacia himno, skoltaj kantoj, kaj rakontoj.
Sur kasedo ankaŭ povas esti la sonoj de la birdoj kaj bestoj de via lando.

Tre bone kaj interesa estas vizito al internacia tendaro
por paroli la lingvon.



## La Skolta Mondo

Ĉe la tablo estas du seĝoj.
Sur la seĝoj sidas Niko kaj Petro.
Kion ili faras?
Niko legas en la internacia gazeto 'La Skolta Mondo'
Kaj Petro korespondas.

korespondi= sendi leterojn al aliaj homoj kaj ricevi leterojn de aliaj homoj.

Ĉu vi volas legi la gazeton, aŭ korespondi?
Jes? Prenu paperon, kaj faru leteron:

Kara skoltfrato,

Mia nomo estas ...

Mi estas skolto/skoltino kaj mi havas ... jarojn

Mi volas korespondi kun skolto/skoltino en alia lando.

Sendu al mi numeron de 'La Skolta Mondo' mi petas.

Korajn saluton kaj dankon de ...

Nun aĉetu en la poŝtoficejo IRK.
Metu la kuponon kaj la leteron en la koverton, kaj... atendu

**IRK = Internacia Respond-Kupono:**
**Coupon Réponse International,**
**Antwortschein,**
**Reply Coupon,**
**Cedola Risposta.**

Per IRK ni povas ricevi poŝtmarkon por sendi la gazeton al vi!

**Ge-**

geskoltoj = skoltoj kaj skoltinoj
geamikoj = amikoj kaj amikinoj
gesinjoroj= sinjoroj kaj sinjorinoj.

Nun vi venas ĉe la fino de la libro.
Vi lernis iom de la internacia lingvo Esperanto.
Sed vi ne jam estas preta.
Vi devas lerni multajn aliajn vortojn por esti bona esperantisto aŭ esperantistino.
Multaj utilaj vortoj por geskoltoj estas en la libro:
**Skolta kaj Tenduma Terminaro.**




Estas bone, kiam vi aĉetas ĝin.



**Karaj geskoltoj,**

Ni helpis al vi lerni la internacian lingvon.
Kaj ni esperas ke vi havos multan plezuron pro ĝi!
Ni faris por vi la lernolibron Ĵamborea Lingvo.
Ni faris tion, ĉar ni estas membroj de la Skolta Esperanto-Ligo.
La celo de SEL estas:
doni la plezuron de Esperanto al ĉiuj geskoltoj de la mondo.
SEL havas geamikojn en multaj landoj de la mondo.
SEL helpis al vi.
SEL ankaŭ volas helpi al vi trovi geamikojn en aliaj landoj.
Sed ... ĉu nun vi volas helpi al ni?
Ni invitas al vi: ankaŭ vi estu membro de Skolta Esperanto-Ligo.
Kiam multaj geskoltoj estas membroj de SEL,
tiam SEL povas doni multan plezuron al ĉiuj geskoltoj en la mondo.
Ni invitas al vi:
Prenu paperon kaj skribu leteron:
Jes, ankaŭ mi volas esti membro de SEL!'

La ses amikoj salutas al vi:

Karto Nico Petro DIKO
Alko Eto

Enhavo

1 La patrolo, & + =
2 skolto - skoltoj
3 unu-unua, du-dua
4 ĉu?
5 mi estas skolto
6 nombroj
7 skolto - skoltino
8 La familia Hanson
9 *Ekzerco*
10 Vidas, helpas, -n
11 Ŝi... virino
12 Kiom? Kiu? Kie?
13 La mondo
14 Kia?
15 Kia estas la standardo?
16 Fruktoj
17 Tago kaj nokto
18 mal –
19 La direktoj de la kompaso
20 Nombroj
Kalkuli
21 Kiu, kio, kie, kiam
22 *Ekzerco kiu- kio- kie- kiam- ...*
*Lordo Baden-Powell of Gilwell*
23 Lazaro Ludoviko Zamenhof
24 -e
25 *Ekzerco li, ŝi, ĝi, ili*
26 Du kantoj
27 La kalendaro
28 -is, as, os
29 litero...libro
30 -n 'La viro kaptis la urso!'
31 -n
32 Kiel skribis la indianoj?
33 Letero de indiano
34 -estro
35 iu, io, ia, ie, iom, iel
36 La ses membroj de la patrolo
37 mia, via, ilia
38 -ulo
39 -ejo
40 La tri ĉapeloj (enigmo)
41 La skolta uniformo
42 Kelkaj partoj de la korpo.
43 La ŝranko
44 *Ekzerco.*
45 La horloĝo; la tempo
46 Ordonoj -u
47 La domo
48 La problemo pri la kvar fotoj
49 Tiel...kiel, pli...ol, plej...
50 Tre
51 Kie estas la Nordo? (1)
52 Kie estas la Nordo? (2)
53 -et
54 -isto
55 Kontrolu vian horloĝon!
56 Plej
57 -eg
58 Ĉiu - neniu, ĉie - nenie, ĉiam - neniam
59 -ebla
60 Rigardu la bildon!
61 -ilo
62 -igi
63 Ĉifroj
64 -ero
65 La vetero
66 La patrolo iras tendumi
67 Niko
68 La problemo de Niko
69 La simboloj de la geografia karto
70 Kia estos la vetero?
71 Trinkaĵoj
72 Fulmotondro estas danĝera
73 Trafiko
74 Petro
75 La Unua-Helpo-Kesto

76 La problemo de Petro
77 Karlo
78 La problemo de Karlo
79 Kelkaj iloj
80 Avertiloj
81 Kiel fari tenilon por la hakilo
82 Alko
83 Signali rapide
84 La Morsa Kodo kaj Esperanto
85 La Morsa Kodo kiel ĉifro
86 La problemo de Alko
87 Ĉi tio, ĉi tie, ĉi tiu
88 Dika Diko
89 Kiel baki cindro-kukojn
90 La problemo de Diko
91 Iloj por kuiri kaj por manĝi
92 Kion ni uzas por hejti?
93 La malgranda Eto
96 (1) Letero al la hejmo
(2) La Krio
94 La problemo de Eto
96 La poŝto
97 La vizito
98 Ĉu vi ŝatas limonadon?
99 *Ekzerco*
100 Teatraĵo
101 -aĵo
102 La Skolta Promeso
103 En la tendaro
104 La Skolta Leĝaro
105 Malfacila problemo
106 La solvo de la patrolo
107 -aro
108 -ujo
109 -igi
110 -iĝi
*111 ekzerco g aŭ ĝ*
112 -ant
113 -ata, -anta
114 Kial?
115 La Skolta Mondo
116 La skolta vortaro. ge-
117 Karaj geskoltoj,

**Solvoj**

9 ***Ekzerco***

*Ĉu unu kaj du estas kvar? Ne, unu kaj du estas tri.*
*Ĉu Karlo estas skolto? Jes, kaj Julia estas skoltino .*
*Sinjoro Hanson estas la patro de Karlo. Karlo estas la frato de Julia.*
*Julia estas la filino de Sinjoro Hanson.*
*La unua skolto en la patrolo estas Niko kaj Alko estas la kvina .*
*Julia estas knabino kaj Eto estas knabo .*
*Skolto numero du estas Petro, la tria estas Karlo*
*kaj la nomo de numero kvin estas Alko .*

22 ***Ekzerco kiu- kio- kie- kiam- ...Lordo Baden-Powell of Gilwell***

*Kiu estis la unua skolto? Lordo Baden Powell !*
*Kiam li naskiĝis? En la jaro 1857 !*
*Kiam li mortis? En la jaro 1941 !*
*Kie li mortis? En Kenio, Afriko !*
*Kie estis la unua skolta tendaro? En 'Brownsea Island' !*
*Kiam estis la unua skolta tendaro? En la jaro 1907 !*
*Kie estis la unua Monda Ĵamboreo? En Olimpia, Londono !*
*Kiam la Monda Ĵamboreo okazis en Nederlando? En la jaro 1937 , kaj en la jaro 1995!*
*Kiom da jaroj estas inter du Mondaj Ĵamboreoj?*
*Inter du Mondaj Ĵamboreoj estas 4 jaroj !*
*Kio okazis en 1957? Tiam okazis la Jubilea Ĵamboreo en Sutton park !*

25 ***Ekzerco li, ŝi, ĝi, ili***

*Usono estas granda lando; Nederlando ne estas granda,*
*ĝi estas malgranda. La standardo de Nederlando havas tri kolorojn,*
*ili estas ruĝa , blanka kaj blua .*
*Ĉu elefanto estas granda besto? Jes, ĝi estas granda.*
*Julia ne estas skolto, ŝi estas skoltino.*
*Fiŝo ne estas homo, ĝi estas besto.*
*La luno ne brilas dum la tago, ĝi brilas dum la nokto.*

*Ĉu steloj brilas dum la nokto? Jes, ili brilas dum la nokto.*
*Kio estas la koloro de bananoj kaj citronoj? Ili estas flavaj.*
*La tomato ne estas flava, ĝi estas ruĝa.*

33 **Letero de indiano**
**Hieraŭ mi biciklis de la tendaro al la arbaro.**
**Mi vidis cervon. Mi spionis de la mateno ĝis la vespero.**
**En la vespero pluvis. Mi (iris) al la tendaro.**

44 ***Ekzerco***
*La domo por la skoltoj estas la skoltejo.*
*kaj en tiu domo la patrolo havas patrolejon. La bicikloj estas en la biciklejo .*
*Skolto havas uniformon.*
*Sur la kapo estas ĉapelo, ĉirkaŭ la kolo estas koltuko.*
*La kruroj havas ŝtrumpojn kaj sur la piedoj estas ŝuoj.*
*La insigno de Patrol-estro estas du strioj sur la bluzo .*
*Petro estas granda persono, li estas grandulo, kaj Eto estas malgrandulo.*
*Kiel oni skribas 7465 en vortoj? Tiel: sepmil kvarcent sesdek kvin.*
*Dika persono estas dikulo . Blindulo estas persono, kiu ne povas vidi .*
*Surdulo estas persono, kiu ne povas aŭdi .*


48 **La problemo pri la kvar fotoj**
**Je la sepa horo: a, d**
**Je la deka: b**
**Je la dekdua: c**

63 **Ĉifroj**
**Uzu ĉifron por sekretoj.**
**Bonaj skoltoj ne malpurigas aŭ difektas arbarojn.**


68 **La problemo de Niko**
**Ili estas en Ilpendam**

76 **La problemo de Petro**
**Sinjoro Smit mortis, do li ne povis diri, kion li sonĝis.**

78 **La problemo de Karlo**



86 **La problemo de Alko**
**Mi ne venos**



90 **La problemo de Diko**
94 **La problemo de Eto**
**La persono estis la patrino**

99 ***Ekzerco***
1 *Sven vizitas Eton antaŭ la tagmezo.*
2 *Li diris: Bonan Matenon.*
3 *Ne*
4 *Ne, dankon!*
5 *Jes*
6 *Jes, volonte*
7 *Jen, mi petas!*
8 *Dankon, ĝi estas bongusta!*
9 *Bonan apetiton!*
10 *Ĉar li revidos lin en la vespero*
11 *Tio estas "Adiaŭ"*
12 *Li diros "Bonan vesperon"*
13 *Eto diros tion.*
14 *Kiam iu iras al la lito.*

105 **Malfacila problemo**
**Antonio povas helpi. Li parolas france kaj portugale.**

111 ***ekzerco g aŭ ĝ***
*Diko preparis teon. Li varmigis la akvon.*
*Kiam la akvo estis varma, li metis tefoliojn en la akvon.*
*Post kelkaj minutoj la teo pretiĝis. Tiam Diko plenigis la tasojn.*
*Kiam la tasoj malpleniĝis, Diko denove plenigis ilin.*
*Ĉu vi ankaŭ satas teon? Sed la poto jam malpleniĝis kaj Diko ne plu havas teon por vi!*
*Nun la tasoj malpuriĝis. Petro purigos ilin kaj Karlo sekigos ilin per tuko.*